

Flandra ESPERANTO

TIJDSCHRIFT VOOR ESPERANTO - ONDERWIJS EN - PROPAGANDA

Verschijnt maandelijks
Vijftiende jaargang
Nummer 8-9 (170-171)
AUG.-SEPT. 1948

Vertegenwoordiger in Nederland :
NEDERLANDA ESPERANTO-CENTRO
Huygensstr. 17 B., Rotterdam-W.
Postrekening 514366 van J.C.J. Ham.

Orgaan van de
VLAAMSE ESPERANTISTEN-BOND
POSTBUS 342, BRUSSEL
Postrekening 2321.50 van V. E. B.

LIDGELDEN :
* Leden : 75 fr.
* Steunleden : min. 150 fr.
Inwonende leden : 25 fr.
(* met bondsorgaan)

ABONNEMENTEN :
België : 60 fr.
Nederland : 4 fl.
Ceteraj landoj : 75 bfr.
Proefn. : 5 fr. (1 r.k.)

Het 33-ste Internationaal UEA-Esperantocongres

31 Juli - 7 Augustus
Malmö (Zweden)

Nagenoeg 2.000 deelnemers! In normale omstandigheden had het getal gewis rond de 5.000 geschommeld. Op onze heenreis stonden, te Bremen en te Hamburg, scharen Esperantisten ons toe te wuiven en zij verzochten ons in hun naam het Congres te begroeten: hen was het nog niet gegund een congres in het buitenland mede te maken. Ook de jeugdorganisatie diende op een andere plaats te congresseren. Laat ons hopen dat weldra de dag aanbreken mag waarop geen hindernissen meer in de weg staan en waarop alle Esperantisten kunnen bijeenkomen.

Malmö is werkelijk een ideale stad om een congres bijeen te roepen: zij beschikt over een zeer groot theater waar de pleno-vergaderingen mogelijk zijn en de diverse congresbureau's kunnen geïnstalleerd; over een ruime balzaal in het Volkspark (wat wel vereist is om zo'n massa te laten dansen!); over ultra-moderne scholen met prachtige auditoria waar de verscheidene sectievergaderingen kunnen doorgaan; zelfs over een ideaal buitenoord voor de jeugd, met heuvels, pleinen en dalen, kunstmatig aangelegd, waar de scouts of andere jeugdgroeperingen hun kampvuren kunnen houden, terwijl de belangstellende menigte op de hellingen kan neerzitten. En Malmö heeft ook een stadsbestuur, dat belangstelling voelt voor Esperanto: niet in woorden alleen, ook metterdaad. Was het dan geen kostbaar geschenk, wanneer de deelnemers de mogelijkheid geboden werd gans de week gratis op trams en autobussen te toeren? En was het theehapje dan niet uiterst verzorgd en getuigt het dan niet van de waardering die in die kring voor onze taak bestaat?

Hier hoeft ook gewezen op de grote belangstelling, die de Zweedse pers — vooral de locale, — betoonde voor de gebeurtenis: iedere dag tamelijk uitvoerige verslagen met foto's en in *Skanska Aftonbladet* dagelijks twee à drie kolommen in Esperanto! Wat een verschil met onze inlandse pers, enige uitzonderingen niet te na gesproken: nu en dan iets inlassen, als het ingezonden wordt! Maar gaat er ergens een vergadering door van Mormomen of andere zonderlingen, ho, wat een aandacht en beschikbare plaatsruimte!

Te Malmö stonden we voor de 33-ste maal voor een gebeurtenis die werkelijk wereldschokkend was: uit 35 landen waren mensen vergaderd (ja 35!), mensen die elkaar *rechtstreeks* het woord richtten en *verstonden!* Besprekingen werden gevoerd over de meest uiteenlopende onderwerpen en alles verliep *vlot*, in volmaakte overeenkomst. Wanneer die bedenkingen werden geopperd, fluissterde iemand me in het oor: «Vergeefse moeite, beste vriend! Dat is inderdaad de redding. Maar mag die er wel komen?» Dit kan toch niet waar zijn!

Thans, bondig, wat ons geboden werd. 's Zaterdag, de plechtige opening. Groet van de landelijke Esperanto-organisaties, daarenboven van verscheidene regeringen, die er prijs hadden op gesteld een vertegenwoordiger af te vaardigen met opdracht het congres te begroeten.

's Zondags werd een bezoek gebracht aan de Skana-handelsfoor (Skana, de zuidelijke en vruchtbaarste provincie van Zweden). Groepen trokken tevens door de stad (autobus of boot), om de merkwaardigheden van de stad te bezichtigen. 's Avonds groepsgewijs naar het Volkspark waar een permanente plezierfoor (zoals te Kopenhagen, in «Tivoli») ingericht is.

's Maandags ving de Zomerhoogeschool met haar werkzaamheden aan: deze uiterst belangrijke Esperantistische instelling vergastte ons dagelijks op een voordracht over een of ander wetenschappelijk onderwerp, behandeld door een specialist, en natuurlijk een Esperantist, b.v. Ivo Lapenna, jugoslavisch diplomaat, Dr in de Rechten over «Hoofdprincipes van het Internationaal Recht», Professor Björn Collinder van de Universiteit van Uppsala (Zweden) sprak over de Laplanders en deed een film afrollen, Professor K. Lundmark (Universiteit van Lund) had het over de laatste

bevindingen op astronomisch gebied, Conservator *Stop-Bowitz* (Oslo) behandelde het leven van sommige insecten, Magister *Vilho Setälä* de oude Finse cultuur, enz. enz... U ziet, voor elk wat wils!

Nadien hield de «Wereldbond der Esperantisten» zijn eerste grote werkvergadering: uiteenzettingen over propaganda, bereikte uitslagen, financiële en andere problemen, voorstellen en gedachten, niet alleen van het Bestuur maar ook van de leden, en in een en dezelfde taal, t.l.z. zonder tolken, zonder ontzaglijk tijdverlies! Dit greep bijna dagelijks plaats, waarna, in de namiddag, uitstappen en sectievergaderingen: zo werd er naar *Falsterbö* (badplaats), naar *Lund* (de Universitaire stad met haar prachtige Romaanse Kathedraal), naar de kastelen van *Skane* e.d. gereisd. Maandag avond: kunst- en letterkunde kwamen aan de beurt — onvergetelijk blijven de zacht ontroerende liederen van de Bulgaarse Operazanger *Nuni Nanev*, *Marguerite Sautreuil* van de Parijse radio, de declamatie van de Rus *Vassiliev*, de uitstekende Engelse en Franse pianomuziek... en nog zoveel meer, te veel om maar te melden!

Reeds Dinsdag. Ook filmvoorstellingen, feitelijk dagelijks: Poolse films, die prachtig waren, en Deense en Zweedse, want er zijn enkele Staten o.a. Nederland en Hongarije en Denemarken, die propagandafilms produceren in het Esperanto. En dan komen ook de Esperantisten-dagbladschrijvers bijeen, en de telegrafisten en postbedienden, en de filatelisten, en de blinden (die reeds een talrijke Esperanto-literatuur in *Brailleschrift* bezitten) en de «Universala Ligo», een tak van de «Wereldbeweging voor wereldregering», ook de handelaars en de geneesheren. 's Avonds een cabaret-avond met o.a. het optreden van een Esperantist-goochelaar.

Woensdag. Per boot rond de zeeëngte van *Öresund* voorbij het eiland *Ven*, waar *Tycho Brahe*, beroemde astronoom uit de XVI-de eeuw, op zijn eentje werkte en een bezoek aan *Hälsingborg*. Voor de anderen bezoeken aan musea en de reusachtige scheepstimmerwerken *Kockum* te *Malmö*: bij die laatste gelegenheid hadden wij, van sociaal standpunt uit, veel te leren! Hoe volledig, comfortabel, modern die installaties voor werklieden: uiterst nette en zindelijke eetplaatsen en wasplaatsen. Als straks de arbeider vrij komt, is ook de met roet en zwart bevuilde werker een nette meneer! En werp even een blik in zijn thuis: hij beschikt over een bibliotheek, speelt piano — alles orde, en kraaknet!

En zo houdt dat aan, Donderdag en Vrijdag. Donderdagavond, het Congressbal: vele zijn in nationale klederdracht. Vrijdagavond, avond van de Wereldjeugdorganisatie. De week is dra om — gans gevuld, en zoveel mogelijk droegen wij er van mee.

Zaterdag, de plechtige sluiting. De algemene secretaris *Goldsmith* brengt verslag uit over de werkzaamheden van het afgelopen Congres. Voorzitter *Malmgren* houdt de sluitrede. Daarna wordt traagzaam de «*Espero*» gezongen. Allen staan recht. De reusachtige Esperanto-vlag wordt langzaam neergelaten; dan een laatste woord van de Voorzitter: «Tot volgend jaar in Engeland!» Het Congres is afgelopen!

Reeds stromen zij met koffers en valiezen naar het station en vangen de «Na-Congressen» aan: want, daar toch ongeveer iedereen langs *Stockholm* of *Copenhagen* reist, werd er in die twee steden een verblijf van een drietal dagen georganiseerd. Daarna, voor de bevoorrechten, die nog verlof genieten, een heerlijk verblijf te *Lofthus* (Noorwegen), nabij de *Hardangerfjord*. De Esperantisten willen werkelijk niet scheiden!

Twee constataties dringen zich op. Wie eens zo 'n Congres heeft meegeemaakt, wil er terug naar toe, ook al moesten alle programmapunten mislukken; het feit van bijeen te komen met zoveel en zo ver verwijderde vrienden, trekt ongeloflijk sterk aan. Het zelfde verschijnsel als bij onze nationale Esperanto-Congressen, die te kort zijn...

«Mia kara Litovujo»

Sur la litova tero vivis kvin diversaj popoloj unu apud la alia, ofte en la samaj urboj, kun diferencaj religioj kaj rivalaj ambicioj. Genio kiel tiu de *Zamenhof* devis ja tie estiĝi, sorbigita de doloraj malpacoj. La *Majstro* efektive naskiĝis en urbo *Bjalistoko*, kiun poste famigis la teruraj pogromoj de 1905.

Ni scias, kiom lin turmentis la spektaklo de malamo, kiu prezentigis antaŭ liaj knabaj okuloj; kiom li suferis nur aŭdante paroli pri *Poloj*, *Rusoj*, *Judoj*, *Germanoj* aŭ *Blank-rutenoj*. La sendistingan amon, kiun li sentis por ĉiuj siaj samlandanoj, li ankaŭ sentadis por la tero, kie liaj junaj revoj kristaliĝis en formo de universala lingvo.

Pri sia patrolando, nome la historia *Litovujo*, pli frue okupita de la *Rusoj*, poste apartenanta al *Pollando*, la *Majstro* kortuŝe iris en 1907 dum parolado en la *Londona Guildhall*:

«Vi staras nun antaŭ miaj okuloj, mia kara *Litovujo*, mia malfeliĉa patrujo, kiun mi neniam povas forgesi, kvankam mi forlasis vin kiel knabo... Vi, kiun mi ofte vidas en miaj songoj, vi kiun neniam alia parto de la tero povas anstataŭi en mia koro...»

Estis en la litova urbeto *Veisiejai*, ke *Zamenhof* reverkis la de l' patro nenilgitan manuskripton de la lingvo internacia. Multajn noktojn li pasigis kurbiginta ĉe sia skribotablo kaj, laŭ la aserto de la dommastrino, konsumadis dumsemajne tri funtojn da vaksandeloj. Ege nervema li ofte forremadis profundon en la lago por eviti renkontigon kun homoj. En tiu tempo (1887) li verkis la doloran «*Ho, mia kor!*». Tie li hezitis «ĉu transiri la *Rubrikonon*». En *Litovujo* D-ro *Zamenhof* trovis amikan aprobon kaj munsuŝtenon por sia utopia afero; tie li trovis vivamikinon, edzinon *Klara'n*; ja en litova lando li jam de la unuaj tagoj trovis fervorajn adeptojn. La entuziasma litova pioniro, prelato *Dombrovski* (1860-1938) rakontis, ke li estas varbita en 1887 per... jena gazeta informo: «la tutmondaj ŝtelistoj de nun povos ekuzi tiun novan interkomprenigilon por siaj internaciaj celoj!»

Ni memoras la historion de la antaŭmilita sendependa demokrazia respubliko kun nur 3.2 milionoj da enloĝantoj, formita el la antaŭaj rusaj baltmaraj provincoj. Ĉu paco? En 1937 la litovaj Esperantistoj ne povis partopreni la jubilean kongreson en *Varsovio*, ĉar inter *Litovujo* kaj *Polujo* ne ekzistis diplomatia rilatoj... Ni memoras *Vilno'n*, *Memelo'n*... Ni memoras la lastan militon.

Guste antaŭe *B. Giedra* forsendis sian beletan poemaron *Violetoj*:

«Flugu mia kordekklamo
al la vasta mondo
kaj instigu ĝin al amo
al pacema rondo!»...

Feliĉa popolo, kiu ne havas historion: *P. Giedra* kun preskaŭ duona centmilo da litovoj estis transportata al *Siberio*. Poste la *Germanoj* pereigis en la lando *Judojn* kaj bolŝevikigintojn. Inter la malfeliĉuloj estis multaj Esperantistoj. Duoncento da litovaj samideanoj, fuĝintaj okcidenten, troviĝas en D.P.-kampoj en *Germanujo*. En *Sovetio*, en okupita *Litovujo*, samkiel iam en «*faŝisma Hitlerio*» plu ne ekzistas Esperanto-movado.

Sed «*Esper*»-antistoj neniam malesperas. En 1937 *Litova Stelo* faris alvokon por la kolektado de faktoj pri la Esperantomovado en *Litovujo*. En 1947, laŭ *Heroldo* (Aprilo) oni sin turnu al la eks-prezidanto de la *Litova Asocio*... en Germana D.P.-kampoj, s-ano *Enskaitis*, por ricevi informojn pri la estinta movado en lia patrolando...

Tyneverum.

Daarenboven staat men verstomd voor de mogelijkheden, die het Esperanto biedt, over datgene wat het Esperanto aan tallozen schenkt. De Esperanto-beweging is reeds een belangrijke culturfactor... en voor de idealisten een factor ter wereldverzoening. Wellicht wordt onze beweging van allergrootst belang en oefent zij een beslissende invloed uit, zo nog meer mensen daaraan meewerken, zelfs allen, die een enigszins leidende post hebben... wanneer zij van goeden wil zijn en dat eens objectief gaan onderzoeken!

Drs. Fernand Roose

Babilado

Vi pasigis ravan libertempon!
Do, denove ek la laboro, kun freŝa energio!

Vere utilas ke ni ripetu la alvo-kojn, kiujn nia estraro konstante aperigis en ĉi tiu rubriko; ni neniel plendas sed iom pli granda re-ago estus ja bonvena! Post ĉiu pe-to, respondoj venas, sed ne sufiĉaj. La sekciaj estraranoj ĉiu-monate pritraktu la enhavon de *F.E.* kaj ĝiajn direktivojn. Ĉiukaze, ni nun koncentre kaj kronologie rememorigas la plej gravajn aferojn, eble ne tro atentatajn:

1. La «*verdjupego*» de niaj li-ganinoj: ĝis nun la *Bruganinoj* restis solaj!

2. *Amiko-varbado*: ni anoncas baldaŭan cirkuleron, kun novaj ad-ministraj reguloj; ĉu sugestoj en tiu rilato?

3. *Starigo de novaj sekcioj*: sekcioj montriĝas plej fekundaj kernoj por vigla *E-vivo* kaj *-disvastiĝo*. Ni nepre deziras ke la reprezentantoj en *Aalst*, *Kortrijk* kaj *Leuven*, kie loĝas diversaj kompetentaj membroj, okazigu kurson kaj organizu kunvenojn: la utilaj informoj estas jam en ilia posedo. Ili tuj ekagu!

4. *Varbado por nia revuo*: ni konstatis ke multaj konvinkitaj Esperantistoj en *Flandrujo* ne apartenas al iu nacia organizajo. Kial? Ĉu ili vere havus pli pravan kialon ol tiu eksligano *Kiu*, ĉar iu artikolo en *F.E.* ne plaĉis al li, ne plu restis membro? Ĉu Esperantista konduto, ĉu demokrata koncepto? La revuo estas la frukto de niaj komunaj laboroj kaj ideoj: se io malplaĉas, kial ne uzi ĝiajn kolonojn por klarigi sian opinion, respektante artikolon 3 de nia statuto? Reagon similan al la men-ciita, ni konsideras dizerto!

Ni nepre konsideru ke ĉiam validas la regulo: persona kontakto restas la plej granda stimulo. Do propagandu ĉe Esperantistoj kaj *Ne-Esperantistoj* el ĉiuj medioj, precipe ĉe oficiale konataj personoj!

5. Nur 15 geliganoj subtenis nian agadon per kotizo de 150 Fr. (en 1947: 19)!

6. Nur 33 familiaj membroj ĉi-jare! Tamen eblis al ni sendi al ili «*De Esperantist*» dumonatan kaj interesan revuon; ĉu ĝi logos por 1949?

7. Ni provas starigi reton da reprezentantoj tra la tuta *Flandrujo*; ni ree insistas por ke multaj akceptu la postenon, kiu nepre akcelas nian *E-movadon*, tiel ke ankaŭ ili pli efike kaj inde laboru por nia grava tasko.

8. La *M.A.* de *UEA* sciigu sian deziron igi delegito aŭ fakdelegito; post tio la propono estos bonvole ekzamenata.

9. La geinstruistoj adresu sin al nia *Vicprezidanto* Drs *F. Roose*, *J. M. Sabbestr.* 36, *Brugge*, por starigi komitaton de geinstruistoj (*vidu F.E. n° 7*).

Ni atendas sinceran kaj spontan kunlaboradon de ĉiuj, por ke ni eniru la jaron 1949, pli fortaj kaj pli multnombraj ol iam!

Via sekretario,
G. Maertens

OBSERVOJ

POPOLDEMO-
KRATIE.

 Cefredaktoro Assen Grigorov sin deklaris konsternita de mia «aroganteco». Nomi Sovetion — eĉ se nur sub la titolo «Subjektive» — la atakinto de Finnlando, la invadinto de Polujo kaj de la Baltaj Statoj, fi! kia aroganteco... Cetere, ĉiuj ja scias, ke Estonujo, Latvujo kaj Litovujo «eniris kiel liberaj kaj egalrajtaj membroj la Union de Sovetaj Respublikoj». Konsiderante la indignon de cefredaktoro Assen Grigorov, ni inklinas supoze ke tiuj landoj ne nur libere kaj egalrajte, sed eĉ entuziasme eniris la Union!

Krome, ĉiuj ja scias tre bone, ke la civitanoj de Sovetio tute libere el- kaj reeniras sian london. Dubantoj demandu la sovetiajn knabinojn kiuj edziniĝis al anglaj aŭ amerikaj soldatoj, kaj deziris sekvi la amaton al eksterlando.

Imagu ke mi, mizera Pik, kuragiĝis pridubi ĉion tion! Kompreneble, por cefredaktoro Assen Grigorov mi «servus la incitantajn de nova mondilito» kaj indignite li apelacias «la honestajn, demokratiajn kaj pacamajn esperantistojn doni decan respondon al «sumideano» Pik».

Sed ne nur mi pekis, la tuta redakcio de «Flandra Esperantisto» kunhelpis al «naŭza kampanjo»! Ĉu ni ne publikigis karikaturon «en kiu Sovet-Unio estas reprezentata kiel bestaĉo»? Cefredaktoro Assen Grigorov ne rimarkis, ke temis pri pruntita kliŝo, kiu ne nur jam antaŭe aperis en la organo de najbarlanda Esperanto-organizaĵo, sed ankau jam servis tie por la preso de multmilaj poŝtkartoj!

La konsternigo kaj indigno de cefredaktoro Assen Grigorov neniel surprizis nin. Kontraŭe, ili estis atenditaj precize en tia formo. Ni ja scias kian gurditan prozon redaktoro rajtas aperigi en «popoldemokratio».

Ni kompatas cefredaktoron Assen Grigorov — sed ni precipe kompatas lian legantaron. PIK.

U.N.E.S.C.O. EN ESPERANTO.

De U.N.E.S.C.O. is een organisme dat door de Verenigde Naties werd opgericht. «De oorlog is een product van 's mensen geest en het is daar dat hij dient bestreden te worden» oordeelt dit organisme, dat daarom toenadering beoogt tussen de onderdanen van de menigvuldige naties, zijn doel tracht te bereiken voornamelijk door het persoonlijk contact in de hand te werken, en heel in het bijzonder door uitwisseling van leraars en leerlingen.

DE MOEILJKHEID HIERBIJ

is echter de verscheidenheid van de talen der menigvuldige naties die hierin betrokken worden. De klip kan gedeeltelijk omzeild daar waar de U.N.E.S.C.O. voornemens is op rationele wijze de vertaling te bevorderen van de meesterwerken der letterkunde van alle landen. Wederzijds begrijpen door grondige kennismaking op elk gebied is het lofwaardig doel van dit verdienstelijk organisme. Waar het echter op persoonlijk contact aankomt rijzen onafwendbaar de taalmoeilijkheden.

DAAROM ZIJN WIJ VAN OORDEEL

dat dit programma slechts dan met vrucht zal kunnen worden nagestreefd, als de leiders, evenals Tolstoj, tot de bevinding zullen gekomen zijn, dat hiervoor «ofwel al de talen in een gemeenschappelijke taal dienen te versmelten, wat vooralsnog in geen afzienbare tijd te voorzien is, ofwel al de mensen al de talen moeten beheersen, wat even onwaarschijnlijk blijkt, ofwel al de volken één en dezelfde universele hulptaal behoeven, wat voorwaar de beste en meest praktische oplossing van dit voorname probleem blijkt te zijn»

ONZE ACTIE BIJ DE U.N.E.S.C.O.

De esperantisten lieten zich dienaangaande niet onbetuigd en door de Universele Esperanto Vereniging (U.E.A.) wordt nu in alle landen voor het Esperanto-petitionnement aan de U.N.E.S.C.O. geijverd. Reeds miljoenen mensen in al de beschaafde landen der wereld verklaarden zich voorstander van het Esperanto en ondertekenden individueel of collectief het petitionnement. In Vlaanderen wordt deze actie gevoerd door de Vlaamse Esperantisten-Bond (V.E.B.) die o.a. reeds de toetreding vermocht te bekomen van de Vlaamse Jeugderbergcentrale (c. 20.000 leden). Einde 1948 wordt het petitionnement officieel aan de U.N.E.S.C.O. overhandigd.

ESPERANTO DE OPLOSSING.

Wanneer we bedenken dat 75% van ons volk nimmer verder komt dan tot het gebruik van de moedertaal, dan weten we tevens dat de drie vierden onzer volksgenoten verstoken blijven van

Nota de la Redakcio

Ni nepre dankas Flandran Esperanto-Instituton, kiu ebligis la publikigon de du paĝoj da Deveno kaj Vivo de Stojan (p. 3-4), tiel ke F. E. fariĝis sespaĝa. Ni petas pardonon pro iom malfrua aperigo de la revuo, pro ferioj en la presejo!

Esperantologio

Internacia Lingvosciencia revuo pri Esperanto

En la lingvosciencia gazettliteraturo mankas periodaĵo, kiu speciale kaj science pritraktas la lingvon Esperanto(n). Ĝis nun tiaj studoj plej ofte aperis en broŝuroj private eldonitaj aŭ kiel artikoloj en multaj gazetoj, parte nun mal-facile haveblaj. Tio ne favoras, eĉ nebligas la uzadon de la ekzistanta literaturo.

Evidente, sana evoluo de la esperantologio decide akcelos la progresadon de E.; centra organo por esperantologiaj esploroj tial ege helpas. Krome scienca esperantologio stimulas la intereson por tiaj esploroj kaj atentigas pri nia afero neesperantistajn lingvistojn kaj sciencistojn kaj faciligas niajn klopodojn en universitataj rondoj.

Amplekso kaj prezo

La periodaĵo — ESPERANTOLOGIO — aperu per kalendaroj (48—) 64-paĝaj formataj volumojn 250-300 paĝajn. Ĉiun volumon kompletigu titolpaĝo, enhavotabelo kaj indekso de aŭtoroj kaj temoj. Komence la regula eldono de tia periodaĵo ne eblos kaj supezeble necesas ĉ. 3 jaroj por publikigi unu volumon 250-300 paĝan. Por Belgio la abonprezo por tia volumo estos: 225 b.fr.

Enhavo

La ĉefa parto konsistas el traktajoj, bazitaj sur originalaj esploroj pri E.-lingvistiko t.e. fonetiko, leksikologio (vortkunmeto, morfologio, vortkonduko), etimologio, sintakso, stilistiko, evoluo, kompara lingvistiko, lernopsikologio kaj bibliografio. La planita periodaĵo nepre favoros la pretigon de fakaj terminaroj, kiam speciala atento estos dediĉata al problemoj de lingvonormigo, kiuj havas egan praktikan signifon por vastaj neesperantistaj rondoj. Krome la gazeto enhavos: 1) referatojn kaj recenzojn pri publikajoj, rilataj al la celo de la gazeto; 2) notojn (ekz. novaĵojn pri lingvonormigo, E. en universitatoj k.s.); 3) ĉiujn publikajn komunikojn de la Lingva Akademio.

La originalaj laboraĵoj estos akceptataj en Esperanto, la angla, franca aŭ germana; kvankam la plejparto aperos en Esperanto, la publikigado de artikoloj en la menciitaj lingvoj stimulos la intereson en neesperantistaj rondoj kaj i.a. ebligos la publikigadon de lingvistikaj universitataj tezoj pri E. en la diritaj lingvoj. Referatoj, recenzoj, notoj ĉefe aperos en E.

Redakcia Komitato

La periodaĵon gvidos cefredaktoro kaj redakcia komitato; la unua priuĝos la manuskriptojn, se eble kun la helpo de specialisto el la komitato. Ĝi konsistas el: Prof. Dr Björn Collinder (svedo), Prof. Dro W. E. Collinson (anglo), Docento Dro K. Kalocsay LK-ano (hungaro), Prof. S.La Colla, LK-ano (italo), Dro W. Lippmann, LA-ano (usonano), Dro W. J. Manders (nederlandano), Prof. Dro E. Privat, LK-ano (sviso), Magistro V. Setälä, LA-ano (finno), Prof. G. Warinien, LA-ano, (franco), Dro Ing. E. Wüster (aŭstro).

Abonoj

La amatoroj sciigu tion al la cefredaktoro pere de Flandra Esperanto-Instituto P. Van Humbeekstr. 3, Brusel W. kaj ne antaŭpagu. La bazo de 400 abonantoj jam estas atingita kaj la unua 64-paĝa kalendaro aperos komence de 1949. Ni firme esperas la seriozan kooperadon de ĉiuj interesataj esperantistoj por sukcesigi la gravan entreprenon, kiu sendube prezentos al nia movado novajn kaj vastajn eblojn.

Cefredaktoro Dro P. Neergaard, LK-ano, privatdocento.
Turnu vin al:
Flandra Esp.-Instituto.
P. Van Humbeekstr. 3
Brusel-W.

vruchtbaar contact met ander volken der wereld. En waar de grote meerderheid toch geen kans heeft vreemde talen te leren, is het dan niet broodnodig, dat een universele hulptaal wordt onderwezen, die het gewenste contact mogelijk maakt? Aangezien men de massa onmogelijk, benevens de moedertaal, Engels, Frans en Duits kan leren, zal men de enig juiste weg moeten gaan, en vroeg of laat het onderwijs in Esperanto verplicht moeten stellen.

LA STUDANTO

DE ONTLEDING VAN DE ZIN. (Vervolg)

A. Onderwerp en Gezegde.

In de vorige bijdragen (zie Juni- en Juli-nrs), leerden we, dat alle zinnen, die een onderwerp en een gezegde bevatten, volzinnen zijn, en dat onderwerp en gezegde samen de kern van de zin genoemd worden.

Vb.: 1) De vrouw naait. — Door ontleding bekomen we: naait: werkwoordelijk gezegde; de vrouw: onderwerp.

2) De haring is een vis. — Als we ontleden: is een vis: naamwoordelijk gezegde; de haring: onderwerp.

Beide zinnen bestaan dus alleen uit een kern.

Uit de eerste zin blijkt echter niet, welke vrouw naait, wat ze naait, voor wie ze naait, waarmee ze naait, waar ze naait, wanneer ze naait, en andere dergelijke bijzonderheden. De zin: «De vrouw naait», hoewel een volzin, is dan ook zeer vaag, zeer onbepaald.

B. Bepalingen. (Komplementoj)

Om een mededeling te verduidelijken, bedienen wij ons van «bepalingen».

«Bepaling» komt van «bepalen», d. i.: nauwkeurig omschrijven, nader aanduiden. Bepalingen beperken dus de ruime betekenis.

Door aan de zin: «De vrouw naait» toe te voegen, dat het hier gaat over de vrouw van de hovenier, wordt de betekenis van «vrouw» bepaald.

Delen we nu ook mede, dat die vrouw een jurk naait, dan wordt de betekenis van «naait» bepaald.

We kunnen de zin nog nader bepalen, door er aan toe te voegen dat de jurk voor haar kleindochter is.

Zo wordt de oorspronkelijke volzin «De vrouw naait» nu: «De vrouw van de hovenier naait een jurk voor haar kleindochter».

a) «van de hovenier»; b) «een jurk»; c) «voor haar kleindochter» zijn bepalingen.

In de zin: «De haring is een vis met veel graten» is: d) «met veel graten» een bepaling.

Aandacht: Al wat buiten de kern, dus buiten onderwerp en gezegde in de zin staat, heet bepaling (komplemento).

Als we nu de hierboven aangeduide bepalingen wat nader beschouwen, dan bemerken we dat a), c) en d) respectievelijk beginnen met «van», «voor», «met», woordjes, die we voorzetsels noemen, terwijl b) geen voorzetsel heeft. Vandaar det de bepalingen in twee groepen worden ingedeeld: I. Bepalingen met een voorzetsel. — II. Bepalingen zonder voorzetsel.

Vooraleer de eerste soort nader te bespreken, is het wenselijk even stil te houden bij

Het Voorzetsel (la prepozicio).

Voorzetsels zijn woordjes als: op, onder, in, uit, door, over, met, zonder, van, voor, tussen, aan, naar, tot, en andere, die een betrekking uitdrukken tussen twee substantieven.

Vb.: «De kat ligt onder de kast». Het woordje «onder» drukt een betrekking van plaats uit, tussen de kat en de kast. «Het kind riilde van de kou». Het woordje «van» drukt een betrekking van oorzaak uit, tussen het kind en de kou.

Zo zijn er nog meer betrekkingen, die door voorzetsels worden uitgedrukt. Helemaal, in 't Nederlands hebben niet alle voorzetsels een vaste betekenis, zoals blijkt uit de volgende voorbeelden:

- 1) a) De hond zit op de stoel.
b) Jan is op school.
c) Zij strijkt op Donderdag.
- 2) a) Onze bakker woont over de rivier.
b) We spraken juist over je.
- 3) a) Ik schreef aan vader.
b) Die boom is rijk aan vruchten.
- 4) a) Schrijf je met een potlood?
b) De oude vrouw wandelt met haar hondje in het park.

Zó kan de reeks doorgaan!...

En in Esperanto?

In Esperanto worden de voorzetsels alleen in hun juiste betekenis gebruikt, d.i. zoals in de zinnen met a) gemerkt.

Bovenstaande zinnen luiden dus in Esperanto:

- 1) a) La hundo sidas sur la seĝo.
b) Johano estas en la lernejo. (niet: sur la lernejo)
c) Si gladas je jaŭdo. (niet: sur jaŭdo)
- 2) a) Nia bakisto loĝas trans la rivero.
b) Ni jus parolis pri vi. (niet: trans vi)
- 3) a) Mi skribis al la patro.
b) Tiu arbo estas riĉa je fruktoj. (niet: al fruktoj)
- 4) a) Ĉu vi skribas per krajono?
b) La maljunulino promenas kun sia hundeto en la parko. (niet: per sia hundeto)

Bij het gebruik van een voorzetsel, vragen we ons dus steeds af, of het wel de juiste betekenis weergeeft, van hetgeen we bedoelen.

Het zal echter niet mogelijk zijn, een passend voorzetsel te vinden voor zinnen als 1)c) en 3)b). In zulke gevallen, gebruiken we het voorzetsel «je», dat geen vaste betekenis heeft. Gebruik het echter zo weinig mogelijk!

Let wel: Geen enkele van de hier besproken bepalingen krijgt de uitgang n.

Bronnen: Tra la Labirinto de la Grammatiko (Faulhaber); Plena Grammatiko de Esperanto (Kalocsay-Waringhien).

OEFENING 38 (10 punten).

Vertaal in Esperanto (let op de keus van het voorzetsel!)

- 1) Kom je morgen, om drie uur?
 - 2) De vink van onze buurman zingt van de morgen tot de avond.
 - 3) Hartelijk dank voor uw laatste brief.
 - 4) Zijn vader werkt op een kantoor, doch met Kerstmis heeft hij drie dagen vrijaf.
 - 5) Moeder zit op een stoel vóór het huis, en naait voor haar kleindochter.
 - 6) Wij eten met de mond, schrijven met de hand, beminnen met het hart, denken met het verstand.
 - 7) Zij twisten om een kleinigheid.
 - 8) De koelen grazen in de wei.
 - 9) Het boek is van mijn broer, en de vulpen van mijn zus.
 - 10) Ik wandel om de tuin met tante en de nichtjes.
 - 11) In deze rubriek gaat het niet over literatuur, doch over grammatica.
 - 12) Door de overvloedige regen ontstonden veel overstromingen.
- In te zenden vóór 20-9-48 aan het adres: V.E.B., Postbus 342, Brussel. Wie de verbeterde taak terugwenst, weze zo vriendelijk een postzegel in te sluiten.

Verbetering van oefening 37.

- 1) Effektive, la knabino ŝajnas malforta, sed postmorgaŭ mi kondukos ŝin al la kamparo.
- 2) La 33-a internacia Esperanto-Kongreso fariĝis giganta sukceso.
- 3) La blua kaj la blanka roboj montriĝis tro longaj por la fratinetoj.
- 4) Kiel nomiĝas via nova hundo?
- 5) Pro la nubokovrita ĉielo, la luno ne povas lumi.
- 6) Veraj esperantistoj restas fidelaj al Esperanto.
- 7) Ĉu vi scias ke la baleno ne estas fiŝo, kaj la vesperto ne birdo?
- 8) Li ŝajnas hispano, lia frato hungaro; tamen ambaŭ estas veraj nederlandanoj.
- 9) Multaj skaraboj estas malutilaj por la agrikulturo.
- 10) Du siteloj akvoplenaj montriĝas tro pezaj por tiuj junaj ŝultroj.

De Redactie antwoordt.

Over Oefening 36 (Juni-nr.)

- 1) «Vader en moeder»: la patro kaj la patrino, of la gepatroj: het lidwoord is noodzakelijk (zie October-nr., 1947)
- 2) «Of hij geld nodig had»: du (niet: se!) li bezonas monon, want hier gaat het om een indirecte vraag.
- 3) «Een lelijk gezicht trekken»: fari grimacon, of eenvoudig: grimaci.
- 4) De juiste vertaling voor: «niet kunnen laten te lachen» is wel: ne povi ne ridi.
- 5) «Dat komt er van!» werd op verschillende wijzen vertaald, waarvan aan te bevelen: Jen kio okazis! — Jen la konsekvenco! — Jen do la rezulto!
- 6) «Je haar is goed gekamd»: viaj haroj (niet: via haro (!)), want je bezit toch meer dan één haar, hopelijk!, of: via hararo.
- 7) «zulke»: tiaj (noch tloj, noch tiuj).

La ĉi-monatan premio-kuponon — pri kiu vi legis en la junio numero —, akiris unu el niaj plej fidelaj ensendantoj de la indikitaj taskoj: S-ino B., el Laak-Houthalen. Ni sincere gratulas sin pro la atingita poento-nombro (104,5), kaj esperas ke ŝi plenkuraĝe plu ensendos pli kaj pli bonajn taskojn. Imitinda ekzemplo!

Jus aperis:

Morto de Trajno

de Freeman Wills Crofts
Tradukita el la angla de
Mason Stuttard

256 paĝoj. Bindita 85 bfr.

Flandra Esperanto-Instituto
P. van Humbeekstr. 3, Brusel-West
(poŝtkonto 3268.51)

9.

DEVENO & VIVO

DE LA LINGVO ESPERANTO

originale verkis : Petro Stojan

En la rusa, pola, germana, franca, k.a. la artikoloj (der, die, le, la) aŭ la finaĵoj, determinas la du (aŭ tri) seksojn. La *tablo* estas ina por Francoj, vira por Rusoj. La *humo* estas vira por Rusoj, ina por Francoj, neŭtra por Germanoj! Angloj ne havas tiajn seks-kategoriojn, kaj Zamenhof tion adoptis en Esperanto, sed nur formale. Interne, en la radik-sencoj la du seksoj restis; bedaŭrinde, malutile por la klara pensado.

La verba senco de pluraj radikoj montrigis neoportuna, ĉar ĝi sekvis dusencenon. Ekzemple, la radiko *gravur'* donas la substantivon «gravuro», kiu ŝajnas esti «gravurita bildo», ruse *gravura*, france *gravure*, k.a. Kaj tamen la fundamenta vortaro donas al tiu vorto la sencan de ago: gravuro = gravurado, nur pro tio ke la pura radiko *gravur'* ne signifas bildon, sed agon, laboron, nacie determinitan per la verboj: france *graver*, germane *gravieren*, k.a. En kazo de la «gravur» la praktika vivo detruis la teorion vortaran sencan, dekretitan de Zamenhof.

Zamenhof intencis krei lingvon memstaran, interne produktivan, kiu posedus 100.000 ideo-vortojn, kombinitajn el 1.000 radikoj. Kontraŭ la senviva franca serio: *eau - aquatique - hydropathie - waterballast*, la Zamenhofa lingvo havis: *akvo - akva - akvokuraco - akvoŝarĝo*. La malfeliĉaj Francoj esprimas unu ideon de «akvo» per 4 malsamaj radikoj!

Alia ekzemplo: *l'homme - les gens - humain - anthropophage*, kun 4 radikoj, enhavas nur unu ideo-radikon: *homo - homoj - homa - hommanĝulo*.

Estas du du sistemoj: la unua ŝatas havi tiom da radikoj kiom da vortoj, kvazaŭ la valoro de lingvo estus en la nombro de vortoj; la dua ŝatas esprimi multajn vortideojn per malmultaj radikoj, ĉar ĝi valorestimas la idean sencan pli ol la vortan formon. La unua sistemo estas en la itala, hispana, portugala, ... La dua sistemo - en la plimulto da slavaj & orientaj lingvoj, precipe en la sanskrita, greka, teŭta (germanida), rusa, araba. La angla kaj franca okupas mezan gradon: en sia altsocia vortaro, abunda je grekolinaj, ili apartenas al la unua sistemo. Sed iliaj popol-dialektoj preferas la duan. Jen ekzemplo:

1-a sistemo: *la convalescenza, la convalecencia, a convalescenza, la convalescence.*

2-a sistemo: *the recovery, die Genesung, vyzdorozhenie, tillfriskning, oporavljanje.*

Por nesperta naivulo, la 1-a sistemo havigas belan internacian unuformecon, sed la 2-a nur malregulan malordon. Por sperta lingvisto, male, nur la 2-a sistemo meritus esti adoptata por lingvo memstara, riĉa el sia propra trezoro.

Meditante pri tiuj du malsamaj sistemoj, la juna Zamenhof komparis, ni supozu, la belan internacian vorton: *konvalescenco*, kun la stranga (unuavide): *resaniĝo*! Li diris al si mem: se mi adoptos la unuan, ŝajne belan, sistemon, ĝi eble plaĉos al malmultaj Angloj, Francoj, Germanoj, kiuj admiras la sudan latinidan kulturon... Sed, samtempe, ĝi certe malplaĉos al la plimulto de la nacioj! Pli detale ekzamenante la rolon de la franca vorto *convalescence* inter ceteraj francaj vortoj, ni tuj vidas ke ĝi estas «fremda» vorto, ne ligita al la simil-sencaj: *santé, guérir, rétablir*. La vorto *convalescence* estas same fremda por la tuta franca popolo, kiel la vortoj *concupiscence, conchyliologie, cothurne, coagulation, codicille*, kma.

Ĉiu «fremda» vorto estas kvazaŭ morta pupo, mumio, kiu ne partoprenas en la viva lingva cirkulado. Male, en la dua sistemo, la vorto *santé* estas plurfoje kaj nature ligita kun parencaj vortoj: *sain, malsain, sanitaire, insanté, sainement*,...

La dua sistemo, komplete disvolvita, ne posedas fremdajn vortojn. La angla *recovery* (resaniĝo) estas ligita per sia prefikso kun: *recollecion, recomfort, reengage, refreshing*,... — per sia radiko kun: *cover, discover*,... — per sia finalo kun: *discovery, misery, lottery, butchery*,...

La juna Zamenhof ja sciis ke la simpla nearistokrata popolo ŝatas la duan sistemon, sed ne ŝatas la tro komplikitan unuan, kreitan de la alta klaso kun klasika super- edukiteco.

Zamenhof spertis mem la cerban torturon de la klasika lico (: gimnazio), kie li devis parkerumi longajn tekstojn el Homero, Cicerono, Demosteno, Ovidio, k.a. por... poste forgesi & forgesi ĉion. Tiu klasika lernejo estis intence deviga en tiama aŭtokrata Ruslando, por sferigi la junajn cerbojn, por ne permesi al ili la aktivan agadon en la reala ĉiutaga vivo. Ankaŭ en Okcidenta Eŭropo la klasikismo greko-latina havis siajn viktimojn.

En «*Le Journal Illustré*» (6.3.1898) ni legas artikolon de Alfred Barbou, kiu citas plurajn francajn eminentulojn, kies opinio estis tute kontraŭ la vana klasika instruado. La akademiano Jules Lemaitre volis ke anstataŭ la mortaj oni studu, kaj studu praktike, unu el la modernaj lingvoj, necesaj por la vivo. En 1888 Raoul Frary publikigis akran kulpigon kontraŭ la latino. La klasika instruado, tia kia ĝi floris en la mezo de la XIX-a jarcento, estis ido de la XVI-a jarcento, kaj fine ido de la Mezepoko. Alfred Barbou konstataas ke la «klasika sistemo preparas junulojn por sterila profesio, en kiuj oni precipe parolas kaj bestile skribas: politikuloj, advokatoj, gazetistoj, oficistoj... Tiaj gvidistoj kondukas Francujon al senpoveco, malaktiva elnervigo.»

Esplorante ankoraŭ pli profunde, ni trovas ke siatempempe eĉ la latina & greka lingvoj estis laŭ la dua sistemo; ke en iame vivanta latino la vorto *convalescentia* ne estis fremda, sed vivanta lingvero, regule kunmetita: *con-val-esc-ent-ia* = kun-san-ig-ant-eco! La greka geografa = *ter-priskrib-ado*, kaj multaj nunaj nacilingvoj posedas siajn proprajn vortojn por diri «geografio»: la serba *Zemljopis* (ter-priskribo), la germana *Erdkunde* (ter-kono), la sveda *jordbeskrifning* (ter-priskribo), la ĉina *ti-li* (ter-regimo), la rusa *zemlevedenie* (ter-sciado), ktp. Se nia lingvo estus disvolvita normale, ĝi nun havis la vorton: *terologio*, apud la similaj: *birdologio* (ornitologio), *homologio* (antropologio), *grundologio*,... kiel ja ni jam posedas: *sociologio*.

La kritikuloj riproĉas al Esperanto ĝian barbarecon, pro la propraj vortoj (resaniĝo, homaro, kunveno,...), tamen ne riproĉas al la angla lingvo ĝian pligrandan barbarecon: *sunday* (dimaŭno), *monday* (lundo), *saturday* (sabato), *misfortune* (malfeliĉo), *mistake* (eraro), *gooseberry* (anser-bero! = ribo), *customhouse* (kutima domo = doganejo!), *plane-tree* (plata arbo = platano!) & mil-mil ceteraĵoj!

Du motivojn havas la adeptoj de la unua sistemo: propaganda kaj stila. El ambaŭ motivoj ili pravos. Unue, por altiri neesperantan mondon, mondon de Okcidenta

Eŭropo, estas pli trafe ne uzi la formojn, kiuj ŝajnas «barbaraj». Ekz., anstataŭ uzi: kunsido, unuigo, ĉion-scianta, estraro, hejma, libraro,... oni uzu prefere: seanco, alianco, omniscienca, aŭtoritatoj, domesto, biblioteko. Por akceptigi Esperanton — lingvon regulan, logikan kaj facilan, ili proponas ĝin unue fari neregula, nelogika kaj nefacila, sed nur por altiri novulojn. Post la venko ili konsentus reveni al la pure esperantaj formoj. La dua motivo, ke la kunmetaĵoj ne estas precizaj, nek klaraj, unusencaj. Ekz. oni neniam scias ĉu *pafilego* estas nur granda pafilo aŭ kanono, ĉu *papaveto* estas malgranda papavo aŭ ia malgranda speco de papavo, ksp. Efektive, nek Zamenhof, nek la Fundamento, nek LK, donis iajn regulojn por fiksi la vortfaradon. Kiuj (kiel De Saussure) provis tian fari, por iniciati novan praktikan elprovaĵon, tiuj laboremuoj estis anatemitaj kiel danĝeraj reformantoj.

La ŝatantoj de la propra trezoro ankaŭ rezonas ĝuste: ni reklamas ke Esperanto estas treege facila, do lasu ĝin tia, kia ĝi eliris el la manoj de Zamenhof. Ni ne trompu la publikon per trukitaj «internaci-aspektaj» tekstoj, dum la vera lingvo estas «barbara», kun «teruraj» kunmetaĵoj. Ni ne ŝercu kun la trukado de tekstoj destinitaj por fremda publiko, ĉar se vere ni altiras milojn da novuloj per tio, ni ilin tuj poste perdas, kiam ili rimarkas la trompon. Pli valoras dek mil fidelaj kaj lojalaj adeptoj, ol cent mil trompitoj, kiuj morgaŭ forlasos nian aferon. Se Esperanto estas lingvo, ne jargono, ĝi havu propran kostumon, honeste kudritan, ne arlekenan karnavalveston, kiu aspektas diverskolora por diversaj rigardantoj. Ni ne devigu nian lingvon fariĝi bufono, kiu turnas sin antaŭ publiko, por flati ĝin per komplimentoj ĉiunmomente variaj, laŭ la cirkonstancoj.

Pri la precizeco, ili diras ke la vorto *ĉielŝtono* estas same preciza kiel la vorto *aerolito*, se ni unufoje por ĉiam fiksis ĝian signifon, sed ke ĝi estas eĉ pli klara, ĉar la «scienca termino» (aerolito) povas elvoki la ideon de «lito en aero», de hamako, dum la esperanta kunmetaĵo, eĉ miskomprenita, sencus nur: «ĉiela ŝtono» kio estas proksima al la ĝusta ideo (solida korpo el ĉiela spaco).

En la nuna stato la vortfara problemo estas nesolvebla, ĉar mankas du principaj kondiĉoj por ebligi la solvon: libera diskuto kaj taŭga materialo. Do, la solvo en estonto povos atingiĝi jenmaniere. La aŭtoritatoj institucioj bonvole lasos plenan liberecon al ĉiuj uzi kaj studi la lingvon, ne malhelpante ilin per anatemoj aŭ intrigoj. Verkante estos libera uzi novaĵojn, teoria studento estos libera proponi novaĵojn, ano de LK estos libera diskuti ilin, kaj helpi al ĉiuj per siaj fakaj rimarkoj. Post tiaspeca libera periodo venos la momento kiam oni havos tri disvolvigitajn sistemojn: okcidenta prunteprenema, miksitaj, kaose kreanta, orientala regule kreanta. Preskaŭ por ĉiu derivita ideo oni havos tri formojn, libere evoluantajn, ekzemple:

antaŭdestinita	fatala	predestinita
kontraŭpluvilo	pluvombrelo	paraplavo, pluvelo.
malgranda	mikra	eta, mika
profundegaĵo	abismo	senfundo, abiso
malproksima	fora	tela, telea

Iu grupo da spertuloj studos la tri sistemojn laŭ iliaj praktikaj valoroj, (ĉar por lingvo sole praktiko gravas), kaj sendube oni konkludos, ke unu sistemo superas du aliajn. Tia juĝado neebas en mena tempo, kaj se la libereco daŭre mankos, ĝi estos neebila ankoraŭ longe.

Oni povas demandi, kian sistemon uzas ĝenerale la naturaj memstaraj lingvoj por formi novaĵojn. Unuavide ŝajnas ke -diversajn sistemojn. Sed, se ni revenas al origino, ni trovas nur unu solan sistemon: *kunmetaĵon el la propra trezoro*. Jen kial. Ni vidu ekzemple anglan vortaron. Ĉiuj kunmetitaj anglaj vortoj estas jam je nia favoro: ni ilin preterpasu. Restas pruntaj. Ni lasu tiujn kies deveno ne estas konata. Restas aro da latinaj, grekaj, francaj, arabaj k.a. vortoj. Nun, ni prenu unu post alia tiujn vortojn, kaj per la sama procedo, ni serĉu ilian devenon. Se ili estas kunmetitaj el propra trezoro, ili estas jam je nia favoro. Se tiu aŭ alia latina, greka, franca vorto estas elpruntita, ni serĉu ĝian devenon: keltan, egiptan, araban k.t.p. Daŭrigante tion ĝis la limoj de nia povo & kono, ni alvenas al la konstato, ke ĉiuj homaj vortoj finfine estas: aŭ son - imitaj interjekcioj, onomatopoej, klamoj (ekzemple: kukolo, grilo, oh, ne, a, uf!), esence simplaj nedismembreblaj, aŭ estas kunmetitaj el sia trezoro. Du ekzemplaj sufiĉu: la angla vorto *Bishop* venas el la greka *Episkopos*, kiu siavice venas el du radikoj: *Epi* (sur) kaj *skop* (rigardi), do estas kvazaŭ Survidanto, Enrigardanto, Inspektoro. La angla vorto *Dandelion* venas el la franca *Dent de Lion*, leondonto (speco de planto kun akraj folioj). Do, proponante «politeismo» (en loko de: multdieco), kiel unuradikaĵon, oni eraras, ĉar ĝi estas tri-radika: poli (multe), te (dio) & ismo!

La bona dua sistemo, kiun unuatempe adoptis Zamenhof, ne plene sukcesis & li enkondukis centojn da unuasistemaj (fremdaj) vortoj.

Kial ne sukcesis? Tion ni tuj vidas. La kreada metodo (1875-1885) de la juna Zamenhof estis jena: unue li starigis la gramatikon kun la finaĵoj & afiksoj, kies nombro estis nesufiĉa por la kompleta vortaro laŭ la dua sistemo. Sed lia ĉefa zorgo estis doni la impreson de ekstreme simpla & facila lingvo kun tripaĝa gramatiketo. Li havis neesperitan penson, ke ĉio kio momente mankas al Esperanto povos kompletigi poste, ke la unua impresado gravas pli ol la kompletiteco. Por faliĝi Volapükon, do Esperanto aperis kiel eta Davido, duone nuda, kun nura ŝtonjetilo — kontraŭ la abunde armita Gollatego.

Kiam la eta gramatiko fiksigis, Zamenhof komencis formi la radikaron, ŝangante la radik-formojn, se ili ne akordis, aŭ malakordis, kun la gramatika afiksaro. Ekzemple, la vorto *farino* iĝis *faruno*, por eviti la inan sencan; *vipero* iĝis *vipuro*, k.t.p.

Kreante kunmetitajn vortojn, Zamenhof agis malprecize, rapide, trankviligante sin per la sama penso: se io nun mankas aŭ ne bonas, tio korektiĝos poste! La nombro de sufiksoj tamen devus esti dekobla, por havi la eblecon de la riĉa vortformado de la dua sistemo. Tion ni jam vidas en la ekzemplo de la rusa lingvo. Tamen Zamenhof ne volis pligrandiĝi la gramatiketon, ne volis plinombriĝi la afiksojn. Kaj jen kiaj kunmetitaj vortoj el tio rezultis; en 1889 li presigis jenajn: egalo, karulo, grandegulo, lertulo, servutulo, ... *homoj*;

unukornulo, kvarpedulo, mamulo, vertebrulo, ... *bestoj*; trimastulo (ŝipo), trikornulo (ĉapo), ... *objektoj*. Se uzo havas tiom largan sencan, kial ni donus, ekzemple, al la vorto *karulo* nur homsencan? Ĝi povus signifii ankaŭ karan besteton (*the pet*) aŭ karan juvelon (*le bijou*)! Oni tuj vidas ke la avantaĝo de la eta gramatiko malaperas pro la malavantaĝo de la neklara vortaro.

Same kun la ujo kiu havas tri sferojn de apliko: keso aŭ vazo, arbo & lando. Pomoj egale signifas: pomkorbo & pomarbo! Nia homa mentaleco ne kutimiĝis al tiaj tro vastaj sencoj, kiuj rezultas el la logika vorterkombinado. Certe, en la franca la vortoj: *pommier, sommier, courrier, comptier* signifas -arbo, lito, homo, vazo. Sed tiujn vortojn oni lernas jam pretajn, neanalizeblajn, ĉar se ni adoptus la francan finalon -ier, ni rajtus diri: *concombrier* (planto, vazo & amanto de kukumoj), ĝardenisto kukuma, kukumisto, k.a.), *vivier* (vivanto, vivulo, vivemulo, vivejo, vivujo, kaĝo,...). Kun tia larĝa libera uzo de nemultaj afiksoj por kunmeti tre multajn vortojn, la lingvo iĝas malklara, nebuleca, enigmo-riĉa:

refari = ? = fari duafoje = ? = fari alie, reformi ?
redoni = ? = doni ankoraŭ = ? = returni ?
travidebla = ? = videbla tra ? travidebla ?
pafilego = ? = ega pafilo ? kanono ?
rideti = ? = ete ridi ? = to smile ? ulyb ?
nukseto = ? = eta nukso ? = avelo ?
gesinjoroj = ? = sinjoro & sinjorino (edzino) ? = sinjoroj & (sendependaj) sinjorinoj ?
ŝipanoj = ? = ŝipistoj (matelots) ? ŝipvojaĝantoj ?
landanoj = ? = indigenoj ? loĝantoj ? enlanduloj ?
izraelido = ? izrael-infano ? izrael-posteulo ?
vortaro = vorta aro ? leksikono ?

Volapük falis en 1889-1890. La nova lingvo (Esperanto) do povis tiam komenci pli serioze disvolviĝi, ne timante pli vastan gramatikon. Sed tio ne okazis pro la malforta krea spirito de la adeptaro. Poste, tio ne okazis pro la fortega agado de la klasikulo Th. Cart, kiu puŝis al la unua sistemo de multegaj fremdaj vortoj, ne permesante novaĵajn sufiksojn, urĝe necesajn.

Tamen, jam en 1889, aperis multaj bonaj kunmetaĵoj, kies ekzemploj jenaj:

insularo = arkipelago	elsaltulo = parveno
grandegulo = giganto	molanaso = ejdero
brulumo = infamo	rampulo = reptilio
homevitulo = mizantropo	taggazeto = ĵurnalo
homamulo = filantropo	publikvendo = aŭkcio
popoldiro = proverbo	glutero = argilo
profundega = abisma	aro, ularo = grupo
dipatrino = madono	somerejo = vilao
malsanejo = hospitalo	somertempo = kanikulo
skulptaĵo = skulpturo	libertempo = vakanco
plenaĝa = adolta	pratempa = antikva
ĉirkaŭvido = panoramo	maldo = satano
akvomalsano = hidropso	flueca = likva
renaskeco = renesanco	almiliti = konkeri
fajejo = uzino, fabriko	soldatejo = kazerno
pafaro = salvo	ĉamledo = ŝamo

Rimarkindas la falsaj sufiksoj en la suprecititaj «internaciaj» vortoj: gig-anto, mad-ono, panor-amo, arkipel-ago, infl-amo, arg-ilo, sat-ano, konk-ero, kanikulo, uz-ino, ab-ismo, filantropo, skulpt-uro!

Kaj jen, naciaj vortoj el la unua sistemo, kiu plaĉas al la klasikuloj: *indisposizione, cristallizzazione, envenamiento, establecimiento, desconcertadamente, descorazonadamente, tranquilidad, actividade*,... (El «Manuel de la Conversation» Garnier).

La lingva digneco do dependas laŭ la unua sistemo, de la amasego da silaboj, sufiksoj, prefiksoj, kies kuna senco tamen restas simpla. Sed kie do estas tiuj amantoj de la multvortaluksego? Ni trovas ilin, interalie, en la «*Almanach Gotha*», «*Annuaire du Blason*», «*Whitaker Almanack*», el kiuj ni tiras iliajn nomojn, ekzemple: *Dr Juan Enrique Horacio Perez de la Zampa, Conte Giuseppe Alfredo Battista di Villanueva, Don Carlos Edgardo Antonio del Rio Bamba, General Ramon Joaquin Gilberto de Oca Pella*.

Mizere aspektas — apud tiuj grandaj sinjoroj — la simplaj homuloj, kies nomoj ne rajtas esti pli ol duoblaj: *Albert Einstein, Jean Perrin, Bernard Shaw, Hendrik Ibsen*,...

De 1889 ĝis 1895 aperas en Nurenbergo «La Esperantisto», centra organo, redaktata de Zamenhof mem. En ĝi oni legas ĉion, kio interesis la nov-adeptaron: tradukoj, originalaĵoj, kroniko, lingva diskuto, propono de organizo. La konstantaj abonintoj estis 400-500 aktivaj pioniroj, el kiuj multaj eks-volapükanoj: *Einstein, Trompeter, Devjatnin, Grabowski, Meier, Szmurlo, Abesgus, Kadik, Seleznet, Wahl*,...

Per ili en la lingvon eniris la bona «volapükista» tendenco eviti tro multajn «fremdaĵojn», esprimante ĉion per malmultaj radikoj. Ĝi akordigis kun la sama tendenco de Zamenhof. La «Fundamenta Krestomatio» (1903) estis nur artikolaro, represita el la «Esperantisto» (1889-95). Dum tiuj ses jaroj definitiva formigis Esperanto tia, kian deziris Zamenhof mem, sen latinida influo. La aktivuloj tiam estis precipe: Rusoj, Poloj, Germanoj — do, naciaj kun malfremdaj baz-vortoj. En la sama tempo aperis la Ekzercaro & Universala Vortaro, kies represo en 1905 formis la «Fundamenton».

En la «Fundamento»: 2772 radikoj (& afiksoj) formas mekanismon, kiu produktis 100.000 kunmetitajn vortojn, & povas ankoraŭ produkti ĝis...miliono. Fremdaj internaciaj vortoj ne estas tolerataj. La kernon de la lingvo formas la kunmetaĵoj; jen estas specimenoj de tipaj Zamenhofaj vortoj tiuepokaj: *arbarejo* (silvo), *arbareto* (bosko), *tendaro* (bivako), *bieneto* (vilao), *kulpigi* (akuzi), *klarigi* (ekspliki), *almiliti* (konkeri), *vidado* (vizio), *rampaĵo* (reptilio), *kreskaĵo* (planto), *kolumo*, *buŝumo*, *plenumi*, *brulumo*, *frostumi*, *flugilo*, *tranĉilo*, *pafilego* (kanono), *pafilo* (fuzilo), kma.

Propraj nomoj estis skribataj nur per la 28 esp. literoj: *Varsovio* (Warszawa), *Vieno* (Wien), *Vaŝingtono* (Washington), *Odoso* (Odessa), *Sillero* (Schiller), *Ŝekspiro* (Shakespeare), *Julio* (Julia), *Julio* (Julius), *Mario* (Maria), *Mario* (Marius), *Johano* (John, Jean, Ivan, Giovanni),...

Landonomoj unuformaj: *Rusujo, Francujo, Germanujo, Italujo, Holandujo, Egiptujo, Kanadujo, Irlandujo*,... nur jenaj ekceptoj: *Finnlando, Skotlando, Estlando*.

Malgraŭ la sincera emo esti «logika» & internacie «klara», multaj nelogikaj naciaĵoj enŝovigis: finiĝo (finaĵo gramatika), denove (ree), sin trovas (ekzistas), estanto (nuno), estaĵo (vivulo), patrujo (hejmlando), tombejo (tombaro), juneco (juntempo, junaĝo), bonsona (belsona), bonodora (belodora), kara (kostega, egpreza), sonĝo (revo), memfido (sinfido), memmortigo (sinfido)

mortigo), memestimo (sinestimo), alteco (alto), lom (iomete), karega (multekosta), mljaro (jarmilo), facilanima (malprudenta, nepripensita), batali (lukti), pro la bono (por la bono), esperantisto (esperantano, ja isto estas metia, profesia), ellerni (finlerni, tulterni), multajn fojojn (multfoje), pasintan jaron (pasintjare), vitro travidebla (travideca, travidebliga), okazis stranga historio (okazaĵo, evento),... en ili sin kaŝis nacia influo — rusa, pola, franca,...

ZAMENHOFA REFORMO

Post la unua brila impreso, farita en 1887, kiam la juna Esperanto frapis la mortantan Volapükon — venis grizaj tagoj por la pacienca daŭriga konstruado, por la plenumota programo de Zamenhof, kiu mem ankoraŭ ne komprenis ke lia programo povus esti atakata per la fatalaj vivo-influo. La gramatiko ŝajnis definitiva post 1888. Do la tuta atento koncentriĝis sur la vortaro... kaj neatendite ekombis la malakordo inter, la teoria reguleco kaj la praktika malordeco vortara. Estis multaj flamaj adeptoj, kies flamo etigis des pli, ju pli ofte ili renkontis neagrablajn duŝenojn: *nenia amikeco & ne nia amikeco, ekskursano (lerneja) & ekskursano (montara), en via okulo (estas larmo) & en via okulo (de najbaro), eraro (trompigo) & eraro (aro da eroj), etera (ĉielo) & et-era (magrand-era), faldigo (de ŝtofo) & fal-digo, fiera & fi-er-a, haringo (fiŝo) & har-ingo, tiel fari ĝi ne povas & tiel fari ĝi ne povas, bona laŭdo & bon-alauĉo, al ia celo & alia celo, malbona amuzo & am-uzo, art-rito (ceremonio) & ar-trito (malsano), la bato & l'abato, du katoj & dukatoj (moneroj), libro legata & libro legata (de sinjoro legato), ktp.*

Fakte, tiaj ridetigaĵetoj ne gravas... ili estas neeviteblaj... ili ekzistas kaj ekzistas en ĉiuj lingvoj de la universo; sed la unuaj adeptoj imagis Esperanton « perfekta lingvo » sen esceptoj... Cetero Zamenhof mem malbone influis en la komenco, kiam li zorge evitis ĉian vortoludon: faruno (farino), vipuro (vipero), planedo (planeto)... Poste, li ne plu atentis pri tiaj amuzaj koincidoj sed liaj adeptoj jam adoptis la idealon de absolute regula lingvo, kaj trograndiĝis, eĉ ridindigis la danceron de ebla (t.e. nebla) konfuzo; *vegeta rano & vegetarano, perfida trompo & (agi) per fida sento, kukurbo (legomo) & kuk-urbo (?), konsento (konkordo) & kon-sento (kompreno), korpuso (armeo) & kor-puso (malsano), k.m.a.* La manio serĉi tiajn koincidojn iĝis kvazaŭ malsano, kaj rezulte multaj adeptoj forlasis la movadon... unu el ili (Von Wahl) fine fabrikis novan lingvon! Do, oni multe diskutis pri la plibonigo, reformoj... kaj fine, en 1894, la aŭtoro mem, Zamenhof, deklaris sin preta reformi!

Depost 1888 ja Zamenhof mem senĉese ripetadis ke la lingvo bezonas plibonigi, ke la lingvo devas esti kompletigata, kaj tion li atendis jen de la sciencula kongreso, jen de la adeptaro mem. Li do publikigis sian reformprojekton en 1894, kaj submetis ĝin je la voĉdonado. Lia projekto ne estis serioza. Nun ŝajnas eĉ ke li intence (malice) faris ĝin tia, por ke ĝi ne estu adoptita! Ĝi similis al multaj efemeraj sistemoj, kiuj devis aperi poste kiel malsukcesantaj proponoj, ne pli gravaj ol tiuj somer-papilietoj, kiuj subite aperas multegaj matene, kaj same subite mortas vespere!

Ŝajnas do ke, tedita pro malseriozaj reform-diskutoj, li volis montri ke ĉia provo reformi Esperanton estas absurdaĵo!

Sed Zamenhof mem slavice trompigis, pro sia nesparteco en ĝenerala lingvo-scienca & en lingvo-praktiko. Fakte, li estis nur la plej sperta en Esperanto, plej lerta Esperantisto, sed funde, samnaive kiel liaj naivaj adeptoj.

Antaŭ ol iri plu, ni haltu ĉi tie por bone kompreni la situacion de Esperanto en 1894. Tiamtempe oni parolis pri 40.000 adeptoj... pro la fakto ke vendiĝis 40.000 lernolibretoj depost 1887. La centra organo (en Germanujo) havis 600 abonintojn, el kiuj 360 rusoj, 140 germanoj, 60 svedoj, 15 francoj, 5 italoj... El tiu nombro de 600 estis ne pli ol 300 veraj adeptoj, iom studentaj la lingvon. La karnavaleca Volapük kvazaŭ malaperis depost 1889, kiam ĝia progresema adeptaro amase aliĝis al Esperanto. Ekzistis do nur unu lingvo, kies publika vivo daŭris nur 7 jarojn depost 1887.

Nek Zamenhof, nek liaj adeptoj, komprenis la veran staton de Esperanto, ĉar mankis ĉe ili mondlingva sperteco, bazita sur la studo de pluraj mondlingvaj, komparitaj per scienca metodo. Same naivaj estis tiutempaj oficialaj lingvistoj, kiuj ne kapablis kompreni & juste taksati la mondlingvan problemon en ĝia vasta tuteco... ĉar neniam la homaro havis komunan artefaritan lingvon, neniam la universitataj scienculoj havis la okazon studi ian praktikan provadon de mondlingva uzado. La tiuepokaj lingvistoj estis same nespartaj & naivaj, kiel la samepokaj inventistoj, kiuj revadis konstrui flugmaŝinon, laŭ la birda ekzemplo, t.e. kun du elastaj svingantaj flugiloj, unu vosto, ktp. Eĉ hodiaŭ, 50 jarojn post tiu tempo, la New-Yorka IALA, kun siaj altsciencaj profesoroj, kun centoj da specialistoj, ne kapablas kompreni la veran taskon & programon de la mondlingvo. Post 20-jara laboro, kiu kostis jam unu milionon da dolaroj, en kiu sin oferis tutmonde famaj lingvistoj: Jespersen, Sapir, Debrunner, van Wijk, Vendryes, Hermann, Bally, k.a., post serio da provoj: Esperanto, Ido, Antido, Occidental, Novial, Interlingua... post ĉio ĉi, ni ripetu denove: la IALA ne trovis ĝis nun la veran vojon al la monda helpa lingvo, scienculo konstruota! La IALA en 1947 atingis la samon, kiun en 1907-1909 atingis plirapide la mondlingvistoj: Couturat, De Saussure, Punth, Basso, Bond, Rosenberger, Beerman, Hartl, Weisbart, Jamin, k.a.

Do, returnante denove al tiu naiva tempo de 1894, ni bone komprenu ke la Zamenhova reformo, eĉ se ĝi estis pli serioza, ne povis rezultigi ion valoran por la ĝusta direktado de la tiama mondlingvo: Esperanto. Ĉiu aboninto de la centra organo havis la rajton voĉdoni pri la Zamenhova projekto. Entute voĉdonis 301, el 600 abonintoj, el 40.000 imagataj adeptoj. Por la propono jese voĉdonis 144, kontraŭ voĉdonis 157. Do, 13 voĉoj findecidis la tutan problemon! Tiu negativa solvo sekrete kontentigis Zamenhof, kaj malkontentigis progresemulojn, kiuj malaperis el la adeptaro.

FIKSGO

En 1900, la Pariza Universala Ekspozicio puŝis la mondlingvan ideon al scienca medio, kaj tiam fondiĝis « La Delegacio por adopto de mondlingvo », vasta organizo kiu fine unuigis 1250 profesorojn, sciencistojn, eminentulojn. En ĝi estis ankaŭ deko da esperantistoj-fakuloj. Samtempe, la francaj esperantistoj-sciencistoj: Boirac, Bourlet, Bricard, Javal, Laisant, Sebert, k.a. influis al la granda librejo Hachette & Cie, kiu komen-

cis eldonadi esperantistajn lernolibrojn, vortarojn, verkojn. En la sama urbo, Parizo, Th. Cart fondis « Presan Esp.-Societon », kiu ekkonkuris per simila eldonado. Ambaŭ librejoj do ne ŝatis la publikan opinion ke Zamenhof preparas reform-projekton, ke la Delegacio nepre adoptos ne konatan Esperanton, sed reformitan. La librejo Hachette do sukcesis akiri de Zamenhof la solrajton (monopolon) eldoni liajn verkojn, kondiĉe ke li ne plu ŝangos Esperanton. Zamenhof akceptis & subskribis la kontrakton, kiu tamen restis sekreta dum 3-4 jaroj. En 1905, la Bulonja Kongreso sankciigis la libron « Fundamento », eldonitan de Hachette, en kiu Esperanto restas absolute sama, kia ĝi estis antaŭ 1900. Samtempe, la Kongreso adoptis la Deklaracion, kiu proklamas la libron « Fundamento » sola bazo de Esp., neniam ŝangebla. Tiel fiksigis Esperanto per la unuigitaj fortoj de Zamenhof, de la Librejo Hachette & de la Kongreso.

Th. Cart, nova esperantisto, ne sciis pri la kontrakto kun Hachette kaj estis ĉagrenita per la fakto ke Zamenhof donas siajn verkojn al la franca librejo, sed rifuzas ilin al la pure Esperantista Presa Societo, kies prezidanto li estis.

En 1906, kiam la kontrakto kun Hachette jam estis konata, la Delegacio atingis sian organizon celon kaj oni komprenis ke Zamenhof ne partoprenos en la Delegacia definitiva laboro, celanta reformi Esperanton.

Do, la progresemaj esperantistoj en Parizo, kiuj sciis pri la Hachette-a kontrakto, ekvolis liberigi Zamenhof el la kontrakta ĉeno, por ke li povu kun la Delegacio labori por la lingva plibonigo.

La blinda Profesoro Javal proponis do, el sia propra have, la sumon de 250.000 Fr., pagotan al Hachette, por nuligi la kontrakton. Zamenhof konsentis diskuti la proponon de Javal, kiun li mem nomis « nobla propono »; li do preparis sian reformprojekton kaj venis al Bruselo, tra Parizo, kie li versujne renkontis Th. Cart. En Bruselo, Javal & Lemaire estis mirigitaj de la signifa reformeto, tro nesufiĉa, ne simila al tiu reformo, kiun antaŭe promesis Zamenhof. Ili do postulis kompletan revizadon de la tuta lingvo. Kontraŭ sia antaŭa intenco kaj eble pro la Pariza influo, Zamenhof ne konsentis al la serioza plibonigo kaj devenis al Varsovio en fino de 1906 aŭ en komenco de 1907.

Dum tiuj fatalaj monatoj la gazeto « Lingvo Internacia » (de Th. Cart) forte propagandis la absolutan neŝangeblecon de Esperanto kaj akre atakis ĉiujn progresemajn tendencojn.

Liginte sin per la kontrakto kun Hachette, Zamenhof — tri jarojn poste, en 1906 — ne sentis sin sufiĉe forta por rompi la kontrakton & decidige eĉiri sur la vojo reforma. Despli ke la plimulto da Esperantistoj kvazaŭ obeis al la akra voĉo de la konservulo, Th. Cart.

Pro lokmanko ni ne povas paroli pri la rolo de De Beaufront, fidela disĉiplo de Zamenhof, amiko de Hachette. En 1907, dum la Delegacia laboro, li preparis — kun Couturat — la projekton de Ido, kun sincera deziro atingi la definitivajn formojn de Mondlingvo. Esperanto por li estis nur ponto al pli alta celo.

Neniu senpartia mondlingvano povis opinii ke estis ia perfido, aŭ ia misagado, en la Delegacio. Estis tie nur sinceraj kleruloj, kun De Beaufront & sen Zamenhof, kiuj noble oferis sian tempon kaj penon por trovi la plejbonan formon de Mondlingvo. Nur Esperantistaj ŝovinistoj & falsigistoj kalumniis la Delegacion & la unuajn Idistojn, kiuj antaŭ 1907 estis fervoraj & bonaj Esperantistoj.

Depost 1906, pro la personaj motivoj, Zamenhof silentas pri tio: ĉu — & kiel — plibonigos Esperanto, neeviteble evoluinta al pli matura fazo. Sed la kleraj adeptoj ne forgesas malnovajn & liberajn parolojn de Zamenhof pri la estonta evoluo. Ili do puŝas la lingvon, lasante al la Akademio, oficialan ludadon kun la honoroj, titoloj, laŭroj & kun miloj da barokaj vortoj, similaj al: *bakhanalio, balzamino, baragvino & bazilisko!*

Malgraŭ la sinofera laboro de lingvo-puŝantoj, malgraŭ la efektiva lingva progresetado, la konservemuloj daŭre ilin supersutis per riproĉoj, admonoj, ĉikanadoj & tio influis al la ŝafideca parto de la esperantistaro, kiu kvazaŭ akceptis la dogmon: « La triumfo de Esperanto dependas de ĝia absoluta neŝangebleco ».

La triumfo de la Cart-a partio, kiu daŭris de 1906 ĝis 1916, kaj malpli forte daŭras eĉ nun, estis decidiga por la ena vivo de la lingvo, kiu por ekstera publiko multe kreskis & ŝajne proksimiĝis al la definitiva venko: tutmonda adoptigo.

Sed la ena vivo preskaŭ haltis. La oficialaj Aldonoj nur...aldonis novajn, plejparte neutilajn radikojn, neniam uzitajn: *ambrozio, bazilisko, etiologio, festono, glikozo, homonimo, makarono* (ne makaronio), *pneumatiko, rismo, sinkopo, titano*,... & cent aliajn monstrojn, malvivaĵojn, tamen karajn al la koraj klasikaj.

APOGEA JARSEPO

Inter la Skismo & milito pasis precize sep jaroj, dum kiuj Esperanto atingis plej altan nivelon de la tutmonda disvastiĝo. Tio memorigas la Biblian rakonton pri Egipto, kie sin sekvis sep jaroj sataj & sep jaroj malsataj.

La nombro 7 ludis strangan rolon en la vivo de Zamenhof. Do, ni haltu por vidi tiun rolon, precipe en la kvaroblo de sep.

En la supera teorio de nombro oni starigis tiel nomatan serion da nombro perfektaj: 1 6 28... Nu, la tria perfekta nombro (28) estas samtempe la nombro de Esperanto; tio okazis kiel neantaŭvidebla sekvo de la subkonscia spirita laboro, kiun Zamenhof montris en pluraj punktoj de sia genia produktaĵo. Tiu nombro efektive ludas fatalan rolon en nia movado. La esperanta aboco enienas 28 literojn. Zamenhof estis 28-jara, kiam li publikigis sian unuan libron. Unuatempe nia lingvo estis nomata: « Lingvo Internacia », kaj poste Lingvo de D-ro Esperanto; kaj nur fine: « ESPERANTO ». La kaŭzo estis simpla: la unua libro estis titolita: *Dro Esperanto. Lingvo Internacia*. Nu, en tiu fama titolo estas 28 literoj. Jam delonge oni diras duonserĉe-duonserioze: komencanto fariĝas vera esperantisto depost tiu momento, kiam li komencas ĝuste uzi la akuzativon. Oni diras ankaŭ ke la iama Prezidanto de la Akademio, Th. Cart, estis unua franco, kiu senere uzis la akuzativon. Nu, la fundamenta regulo pri la fama akuzativo estas en la 28-a paragrafo de l'Ekzercaro. Se leganto ankoraŭ hezitas, kaj ne admiras la koincidon, ni povas daŭrigi: la fundamenta gramatiko entenas 28 sufiksojn: la originala kaj traduka verkaro de Zamenhof, entenas 28 librojn! La katalogo de la Cen-

tra Librejo en Parizo (1918-a jaro) indikas 29 librojn... sed la lasta, 29-a, estas la verko « Aspazio », tradukita de l' Zamenhof verkaro, kaj do la fatala nombro ree triumfas.

La Universalaj Kongresoj ĝis nun honorigis 26 urbojn (24 en Eŭropo, 2 en Usono). En 1949 aŭ 1950 do venos la vico de la 28-a urbo, & la Kongreso okazonta en ĝi havos egan gravecon, se la rolo de 28 vere gravas!

La skismo malfortigis la Esperanto-movadon, kiu perdis dekonon da adeptoj & pli ol duonon da scienculoj, eminentaj profesoroj, antaŭe favoraj al Esperanto. Sed samtempe la skismo estis la skuo, kiu ŝtrecigis ĉiujn fidelulojn, precipe tiujn, kiuj jam multon oferis da laboro, tempo, mono, kiuj presigis multajn librostokojn, & tro esperigis siajn amikojn pri la rapida triumfo. Unuflanke do plifortigaĵa idea laboro por Esperanto & aliflanke — kvazaŭ de la ĉielo — falas kaskade serio da donacegoj, heredaĵoj, mon-oferegoj... de Javal, Sebert, Bicknell, Archdeacon, Boirac, Cox, Dor, Fried, Höveler-Cefeč, Meyer, Moscheles, Mudie, Szmurlo, Vaughan, Warden, Hedler... kies kuna monofero superis milionon da orfrankoj. Krome aldoniĝis centoj & miloj da mezaj & etaj donacoj, kotizoj, kiuj havigis ankoraŭ duon-milionon, dum la sep antaŭmilitaj jaroj.

Tio permesis viglan gazet-eldonon & libr-aperadon dum 10-12 jaroj. Abunda ĉefeĉ-ŝlosilaro, lerta propagando ĉiuspeca, kompensis la perdojn de 1907 & 1914 la adept-nombro superis 100.000... kiam ekflamis la monda milito. Do, ni haltas je la jaro 1913 por vidi la lingvo-staton.

Tiam la lingvo transiris la limojn de Eŭropo: aperis adeptoj en Japanio, Armenio, Brazilo, Hindio, Kubo, Palestino, Samoso, Siamo, k.a. Aperis la Nova Testamento en la oficiala Eldono de la Brita Biblia Societo. Aperis unuaj Esp.-Esp. vortaroj de Kabe & Boirac, teknikaj kaj fakaj vortaroj, kaj la reto bone organizita de UEA-delegitoj, kiuj — pro la senĉesa praktiko — perfektigis la ĉiutagan lingvon, skriban & buŝan. Por la lingva unueco estis precipe gravaj la paroladoj (prelegoj) en viva Esperanto de fremdaj samideanoj, de rond-vojaĝantoj, el kies nombro tiam ekfamiĝis Parriŝ, Pitlik, Privat, tri portintoj de la bela elparolo, aŭdata en interesaj prelegoj. Dum tiu memorinda tempo (1908-1915) la lingvo Esperanto eniris la periodon de la vivanta uzo, de la libera buŝa uzado. Antaŭ 1904, male, la tuta « vivo » samideanara konsistis en letera skribado. Lokaj naciaj kluboj, grupoj... parolis ne en Esperanto sed nur pri Esperanto. En la unua Lingva Komitato, inter 100 membroj estis nur 10 kapablaj libere esprimi sian penson per klare aŭdebla buŝa parolo. En la sama tempo disfloris teatroludoj en nia lingvo, precipe komedietoj, ĉe lokaj societoj & grupoj, kie antaŭe ne aŭdiĝis viva Esperanto-parolo. Tio influis al la klubo babilado, tre grava por la evoluo de la parollingvo. Tie & ĉi tie aperis lokaj aktoroj, oratoroj, poetoj — kiuj lernis la lertan lingvan aplikadon al la societa vivo. Tio estis la unuaj ĝerموj de la Popolo Esperantista.

OFICIALA LINGVO 1913

Nun ni rapide ekzamenos la lingvon, fiksitajn en la Fundamento & en la presajoj de la Lingva Komitato. Do, temas nur pri la « literita » lingvo, komprenebla nur per la okulo de la leganto.

La Fundamenta Gramatiko diras: *Esperanto havas nur unu difinan artikolon « la ».*

La Fundamenta Ekzercaro enhavas ankaŭ duan nedifinan artikolon *unu*: « Unu vidvino havis du filinojn... En unu tago, kiam... Si vidis unu sinjorinon... Unu tagon, promenante apud... « La nombro unu & la artikolo unu estas laŭsence du malsamaj vortoj, uzataj por la du malsamaj ideoj. Kion do pensu pri la cerba mekanismo de niaj Akademianoj, kiuj — post 40-jara laborado — ne estis kapablaj rimarki ke la lingvanoj ne uzas unu, sed du artikolojn!

La Fundamenta Gramatiko diras: « La uzo de la artikolo estas la sama kiel en la franca & la germana ». Tre klare; do, ni devas skribi: « La Nilo, La Rejno... ĉar france: *Le Nil, Le Rhin*... ĉar germane: *der Nil, der Rhein*. La Akademio, kiu protestas kontraŭ *La Rejno*, kaj samtempe deklaras sin « fundamentisto »... estas do unu el la du: aŭ somnambulo (kiu rigardas, sed ne vidas), aŭ malveremulo (kiu scias, sed mensogas). Kaj al kia kategorio — somnambulo aŭ ĉarlata — apartenas ĉiuj niaj gramatikoj: oficialaj, plenaj, kompletaj!?

La Fundamenta Gramatiko diras: « Ĉiu vorto estas elparolata absolute tiel, kiel ĝi estas skribita. » Sed, niaj Akademianoj, Prezidantoj, Poetoj — tre klare elparolas: ogdek (80), egzemple, supteni (subteni), egzisti, egdubi (ekdubi), ktp., ĉar la homa buŝo ne povas alie elparoli!

La Universala Vortaro donas du malsamajn sencojn por la radiko *bov*: por anglo kaj franco ĝi sencas *kastrita plughovo*; por germano kaj slavo — *virseksa bovo*.

Tri ekzemploj sufiĉu, kvankam ĉiu malsomnambulo povas trovi ankoraŭ cent absurdaĵojn en la sankta libro de la oficiala Akademio.

La malracia seksa sistemo de 1888 restis la sama dum 25 jaroj, malgraŭ la opinio de Zamenhof mem (1894), kiu trovis ĝin nepraktika. La Akademio ne ku-raĝis tuŝi tiun seks-problemon, pro la brua deklaro de Th. Cart, ke « La Akademio ne rajtas erari »... do, por ne erari, ĝi ne devas ion ajn « fari », nur « observi » & « protesti » se iu « eraras ».

Tamen la seksa sistemo plilabsurdigis dum la jaroj antaŭ 1914. Unue en pronomoj: la infano estis « ĝi », ĉar ĝia sekso ne estas difinita. La infano estis enkadrita inter la paĉjo (li) & la panjo (ŝi). Ĝis nun — ĉio klara, konfirmata per la Ekzercaro: « *La infano ploras, ĉar ĝi volas mangi.* » Dekdu jarojn poste, Zamenhof subite konsilas en siaj « Lingva Respondoj »: « Pri Dio, homo, infano... uzu li, sed ne ĝi... » Do, ni revenu al nia infano (kies sekso nekonatas), enkadrita inter siaj panjo & patro. Klal tiu senkulpa infano, eble knabneto, devas esti nomata li? La neŭtra ĝi ja estas Fundamenta vorto, & samtempe pli logika, ĉar senseksa! — Ne, pro la sama nekonscia biblia mentaliteco, ĉio senseksa estu... virseksa! Des pli ke la franca lingvo (neposedante neŭtran ĝi) nomas la infanon per la vira li, same kiel anĝelon & diablon.

(Daŭrigota)

LICJO kaj "La Leono de Flandrujo,"

verkis: E. Claes
el la flandra : V.F.B. Mechelen

(daŭrigo)

Ĉar, kiam li pli ol sufiĉe frofros la doloran lokon kaj kvietigis la suferon kaj mildigis sian koleron per ĉiaj vengopianoj kontraŭ *Dries kaj Fompe*, li ĉirkaŭrigardis en la ĉambreto. Fakte ĝi estis la klasa formetejo. Sur la muro, ŝirita mapo, plena de inkmakuloj, malnova kadroportreto de *Leopoldo la 1-a*, sur la planko veraj amasoj da ĉifitaj lernolibroj kaj kajeroj de antaŭaj knabogeneracioj, terĝlobo kun profunda enpremo meze de *Azio* kaj blanka kalkmakulo, du pupitroj unu sur la alia, kelkaj fornotuboj, fenditaj ardezoj kaj ĉiaj malnovaj ĉifonoj devenantaj de la lernejo. Obtuzo lumo enfalis tra luko, supre de la duobla pordo, kiu kondukis al la *Breedestrato*. Mucide en ĝi odoris kaj multe pli freŝis ol en la klaso.

Kaj granda biblioteko tute kovris la malantaŭan vandon de tiu ĉambreto; tie ja staris la «komunuma biblioteko» de *Sichem*. Neniam *Licjo* vidis tiom da libroj kunaj. Li tamen tre bone rekonis ilin. Vintre ankaŭ lia patro venigis librojn de tie, sed *Licjo* neniam povis tuŝi ilin. Knaboj aĝaj kiom li, opiniis lia patro, zorgu nur la bonan konon de la tekismo.

Kaj legito, en la tri subaj vicoj, la diversajn titolojn, orlittere presitajn sur la dorso de ĉiuj libroj, li eliris unu, kies titolo ŝajnis al li pli signifa ol la aliaj: «La Leono de Flandrujo». La vorto «leono» ĉiam profunde impresis *Licjon*. Kaj en la kvinta malvarma formeteja ĉambreto, sidante sur amaso da malnovaj lerno libroj *Licjo* eklegis, legis ke lia kapo ardis, ke li forgesis horon kaj tempon. Kaj kiam la movbruo en la apudaklaso anoncis la kvaran, kaj kiam li aŭdis ankaŭ la instruiston paŝi el la klaso, li forkaŝis la libron sub sian jaketon, singarde apertis la pordon de la ĉambreto, urĝigis el la klaso, kaj unuspire kuris al la kampo, flanke de lia domo. Kaj tie *Licjo* enrampis la sekalon, kaj plu legis ĝis mallumiĝis kaj ĝis li devis hejmen.

